

Ora Ĵurnalo

Numero 88, Oktobro 2025



La edzino de la maristo sopiras...

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Anna ĉe la kajo, <i>Helio Duarte</i>	20
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Anna vid kajen, <i>Helio Duarte</i>	20
Espeporko meditas.....	3	Viglaĵ maljunuloj – ŝerco de Josef Kříž	22
Virino ĉe la maro	3	La franca Esperanto-kastelo Greziljono informas.....	22
La kvin protektitaj minoritataj lingvoj	4	Pri la ekspansio de la angla je la kosto de la sveda	23
De fem skyddade minoritetsspråken	4	Om engelskans expansion på svenskans bekostnad	23
De Espoir Kasati, DR Kongo, kiu vizitis Gotenburgon la pasintan someron	6	Nova romano de Sten Johansson – Farango	24
Listo – korektita.....	7	Preskaŭ nur ĉarmaj bestoj en la paŝtejo de nia Sinjoro!.....	24
Korektoj al n:ro 87 de Ora Ĵurnalo fare de Viktoro Pajuk.....	7	Nästan bara rara djur i vår Herres hage!	24
Jarina Ĉornohuz, <i>Viktoro Pajuk</i>	8	El la revuo Djurens rätt n:ro 3, 2025.....	27
Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la rus-ukraina milito 1917–1921, <i>Viktoro Pajuk</i>	8	Från tidskriften Djurens rätt nr 3, 2025	27
Danco de skeletoj, <i>Eŭgeno Miĥalskij</i>	9	”Limoj” – Gränser – eldonaĵo de Tidskriftsverkstan.....	28
Memore al la tridekopo, <i>Paŭlo Tiĉina</i>	9	Gränser – publikation av Tidskriftsverkstan	28
Internacia Tago pri tradukado, <i>Viktoro Pajuk</i>	11	Unu jaro ĝis la elekto al la sveda parlamento – granda klimatmanifestacio en Gotenburgo.....	29
”Arto en traduko” de Tony Beckwith.....	12	AKTSE, <i>Emelie Hultman</i>	30
La homa arto de interpretado, <i>Riksablo</i>	14	Albumo.....	32
Aŭtomata traduko – Riproĉo, <i>Walter Klag</i>	18	La Mediteranea Esperanto-Semajno 2026 ..	35
Pri eraroj.....	18		
Ett år till riksdagsval – stor klimatmarsch i Göteborg. Cirka 900 personer deltog.....	19		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝarangō: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Ora Ĵurnalo n-ro 88 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe www.esperanto-gbg.org/88



Espeporko meditas



- ♦ **Enaŭguriĝis la domo de la kvin minoritataj lingvoj** la 4:an de septembro en Redbergsskolan, Gotenburgo. Temas pri la sama konstruaĵo, en kiu troviĝas nia esperanto-kursejo. Gotenburgo estas la unua sveda urbo, kiu ofertas Kulturdomon al la naciaj minoritatoj.
- ♦ **La laboro de tradukistoj kaj interpretistoj** oni atentigas la 30:an de septembro tutmonde. Ankaŭ en Redbergsskolan oni pripensis la tradukproblemojn, sed per tradukprogramo en poŝtelefono, kiun finna knabino ofertis al ni. **Pri tradukprogramo ankaŭ Walter Klag, Vieno, pensas** kaj donas ekzemplon pri aŭtomate tradukita poemo, perfekte pri la signifo de la vortoj, sed sen la rimoj (kaj certe ankaŭ la ritmo)
- ♦ **Pri aktualaj interpretistoj skribas Riksablo, el Britio**, kiu studis iliajn laboron ĉe UK en Brno. **Viktoro Pajuk, Ukrainio, donis al ni la fonon de la Internacia Tago pri tradukado, la 30:an de septembro.** La tradukproblemo ne estas nova. En la jaro 404 agis "la patrono de tradukistoj", sankta Hieronimo.

- ♦ **Anna ĉe la kajo** estas fiktiva rakonto de **Helio Duarte**. Duarte estas fervora amiko de la urbo Gotenburgo. Tre delikata ĉiutaga rakonto kun bona etoso.
- ♦ **Emelie Hultgren, pastro en la plej norda Svedio**, bonvenigas nin al nova vojaĝo inter la montegoj. Grandajn panoramojn ni vidos.
- ♦ **Eraroj troviĝas eĉ en Ora Ĵurnalo** 😊 de tempo al tempo. La redaktoro de Ukraina Stelo, Viktoro Pajuk, atentigis nin, ke mankis la atako de Rusio en 1979 al Ĉeĥoslovakio. Ni dankas lin kaj enmetas la korektitan liston.
- ♦ Se vi ne jam konas **la bestokuraciston kaj verkiston James Herriot**, Ingegerd Granat nun ofertas lian konon, se vi legos kelkajn el liaj libroj, listigitaj fine de la artikolo.
- ♦ La organizo: **La Rajto de la bestoj** atingis sian celon: **neniu kokino en kaĝo!** Pri la kokidoj tamen restas multe da laboro.
- ♦ Ĝis la novembra numero de **Ora Ĵurnalo**, kiu tiam estos 8-jara!

/ Siv

Virino ĉe la maro

La frontbildo estas statuo sur 49 m alta turo en la haveno de Gotenburgo, la pinto de la statuo estas 62 m super la marnivelo. Ĝi estas memorigo pri la 690 maristoj kiuj mortis en la Unua mondmilito, la nomoj troviĝas base. Farita de la skulptisto Ivar Johansson ĝi estis

starigita en 1934. Ĝi nomiĝas *Virino ĉe la maro*, sed estas ankaŭ nomita *La marista edzino*. Laŭ la skulptisto ĝi ne nur temu pri la maltrankvila edzino aŭ patrino, sed ankaŭ memorigu maristojn pri la pensoj kaj preĝoj de la familianoj hejme. *El Wikipedia.*

La kvin protektitaj minoritataj lingvoj ...

De fem skyddade minoritetsspråken ...

de Siv Burell

...nun havas loĝejon en la sama konstruaĵo, kie la Esperanto-klubo sabate havas siajn kursojn kaj kunvenojn. La studronda organizo **Vuxenskolan** posedas la ejon.



La 4-an de septembro estis la enaŭguro de la **Minoritata Domo**.

Ĉie estis belaj dekoracioj, eĉ balonoj. Sur la korto estis Bonveniga komitato. Ankaŭ ĉeestis gardistoj – se io okazus. La mondo ŝanĝiĝis.



Kysy kaikkea puhelimestasi = Demandu ion ajn per via telefono – finna teksto sur la brusto de la junulino. Tekniko helpas pri la traduko.

Mi imagis, ke ĉiu minoritato havus sian propran ĉambron – sed ne. Unu nura ĉambro

...har nu hemvist i samma byggnad som esperantoklubben har sina kurser och sammankomster i.



Den 4-e september var det invigning av **Minoritetshuset**.

Överallt var det vackra dekorationer, t.o.m. ballonger. På gården fanns en välkomstkommitté. Vakter var också närvarande – om något skulle hända.



Kysy kaikkea puhelimestasi = Fråga vad som helst i din telefon. Tekniken hjälper till med översättningen.

Jag trodde, att varje minoritet skulle ha sitt eget rum – men nej. Ett enda rum var en

estas komuna **akceptejo** por reprezentantoj de la minoritataj lingvoj proksime al la B-enirejo. Samkiel ni ili devas aboni ĉambrojn.

Eble Esperanto iom similas al la kvin minoritatoj: **judoj, romaoj, sameoj, svedfinnoj kaj Tornedalanoj (kies lingvo nomiĝas meänkieli)**. Esperanto en Svedio ŝajne riskas formorti. Tamen nia celo ja estas tutmonda, ne ligita nur al Svedio.

gemensam reception för representanter för minoritetsspråken, nära B-ingången. Liksom vi, måste de boka in rum.

Esperanto har kanske en del likheter med de fem minoriteterna: **judar, romer, samer, finnar och tornedalingar**. Esperanto i Sverige verkar riskera att dö ut. Men vårt mål är ju globalt, inte bundet bara till Sverige.



Ekspozicio de bildoj faritaj de reprezentantoj de la minoritatoj.



Samea tendo.

La Leĝo pri Naciaj Minoritatoj kaj minoritataj lingvoj estis adoptita en 2009.

Por ke grupo ricevu statuson kiel nacia malplimulto, la Parlamento decidis pri kelkaj kriterioj, kiujn oni devas plenumi.

La grupo devas havi senton de aparteno, kiu estas distingebla de la resto de la loĝantaro.

Ĝi devas ankaŭ havi religian, lingvan, tradician aŭ kulturan distingon, klare deklaritan deziron konservi sian identecon kaj havi historiajn aŭ longdaŭrajn ligojn al Svedio.

Surbaze de ĉi tiuj kriterioj, **judoj, romaoj, sameoj, svedaj finnoj kaj tornedalanoj** estas agnoskitaj kiel naciaj malplimultoj. **Sameoj ankaŭ estas agnoskitaj kiel indiĝenaj popoloj.**

(Informoj de la Distrikta Administra Konsilantaro en Stokholmo kaj la Samea Parlamento.)

Lagen om Nationella Minoriteter och minoritetsspråk antogs 2009.

För att en grupp ska få status som nationell minoritet, har riksdagen beslutat om ett antal kriterier som ska vara uppfyllda.

Gruppen ska ha en samhörighet, som går att urskilja från den övriga befolkningen.

Den ska vidare ha en religiös, språklig, traditionell eller kulturell särart, en uttalad vilja att behålla sin identitet och ha historiska eller långvariga band med Sverige.

Utifrån dessa kriterier är **judar, romer, samer, sverigefinnar och tornedalingar** erkända som nationella minoriteter.

Samer är också erkända som urfolk.

(Uppgifter från Länsstyrelsen i Stockholm och sametinget.)

/ Siv

De Espoir Kasati, DR Kongo, kiu vizitis Gotenburgon la pasintan someron

"Saluton,

Mi volas informi vin, ke mi ĉi-jare finis miajn universitatajn studojn kaj bakalaŭriĝis en informadiko."



Ni diras: **Gratulon, Espoir!**

La Esperanto-Societo de Gotenburgo per **Siv**

- ♦ Eterna movadumanto
- ♦ Sekretario de SEA (Spiritisma Esperanto-Asocio)
- ♦ Membro de Afrika Komisiono de UEA
- ♦ Estrarano de TEJO
- ♦ Komitatano B de UEA
- ♦ Esperantista instruisto
- ♦ Respondeculo de konga ilei-sekcio pri instruado kaj trejnado
- ♦ Loĝas en Lubumbashi/DR. Kongo



En numero 87 ni publikigis liston pri *Atakoj de Rusio 1919 – 2022 (El Fejsbuko)*

Jen la korekta listo, korektita de Viktor Payuk, la redaktoro de "Ukraina Stelo".

Listo – korektita

1917 – Rusio atakas Ukrainion

1920 – Rusio atakas Pollandon

1920 – Rusio atakas Azerbajĝanon

1921 – Rusio atakas Armenion

1921 – Rusio atakas Kartvelion

1939 – Sovetunio atakas Pollandon

1939 – Sovetunio atakas Finnlandon

1940 – Sovetunio atakas baltajn landojn

1956 – Sovetunio atakas Hungarion

1968 – Sovetunio atakas Ĉeĥoslovakion

1979 – Sovetunio atakas Afganion

1992 – Rusio atakas Kartvelion

1994 – Rusio atakas Ĉeĉenion

1999 – Rusio atakas Ĉecenion

2008 – Rusio atakas Kartvelion

2014 – Rusio atakas Ukrainion

2015 – Rusio atakas Sirion

2022 – Rusio atakas Ukrainion **grandskale**
(fakte la milito daŭras de 2014)

???? – kaj – ???? /Siv

Korektoj al n:ro 87 de Ora Ĵurnalo fare de Viktoro Pajuk



Viktoro Pajuk

Koran dankon pro via letero kun korektoj, Viktoro Pajuk! Neniu eraro, kiu ne ankaŭ kunportas ion bonan – ni ja ekhavis kontakton kun la ĉefa redaktoro de Ukraina Stelo!

Antaŭ ol doni la vorton al li, mi rekomendas legon de teksto pri li en Vikipedio. Jen ĝi ĉi-sube. / Siv

El Vikipedio: Esperantista agado

Esperantistiĝis en 1979 en Odeso, studento de Odesa Nacia Akademio de Telekomunikado, de 1982 – membro de E-klubo "Amikeco" (nun – "Spinofloro") (Ternopilo), kunfondinto de la Ukraina Esperanto-Asocio (Poltavo, 1989), ĝia prezidanto (1993–1997); **direktoro de revuo Ukraina Stelo (1991), ĝia ĉefa redaktoro (de 2024);** Ĉefa Delegito de Universala Esperanto-Asocio (2001–2011), kompilanto de la du-voluma Esperanta antologio en ukraina lingvo, Ukraina antologio (la lasta – kune kun Volodimir Pacjurko). Honora membro de UkrEA (2019). Liaj literaturaj

ukrainaĵoj de Esperanta originala literaturo aperis en multaj literaturaj periodaĵoj, inter ili – Vsesvit. Multjara kunlaboranto de Monato. Vikipediisto.

Unu el ĉefaj traduk-kontrolistoj (ekde februaro 2013) de la ukraina eldono de "National Geographic – Ukrainio" – revuo de la Nacia Geografia Societo (Usono).

Prezidanto de la Esperanto-Societo de Ĉikago (2006–2011), redaktoro de novaĵbulteno "Saluton!" (2004–2019, pli ol 180 seninterrompaj ĉiumonataj numeroj).

De 2024 – redaktoro de la gazeto de ukrainaj esperantisto Ukraina Stelo.

Pajuk: Korektoj al n-ro 87 de "Ora Ĵurnalo":

p. 13 Atakoj de Rusujo...

En tiu tempo Soveta Rusujo havis la saman flagon kiel USSR (ruĝa koloro de proletara sango).

Rusujo atakis Ukrainujon en 1917 (ne en 1919), tuj post Oktobra renverso.

1968 – Sovetio atakis Ĉeĥoslovakion (ne Afganion).

1979 – Sovetio atakis Afganion.

2022 – Rusujo atakis Ukrainujon grandskale (fakte, la milito daŭras de 2014).

p. 14 Pri Jarina Ĉornohuz...

Vi publikigis foton de Jarina kun E-traduko de ŝiaj poemoj. Jen pri ŝi:



Jarina Ĉornohuz

Jarina Ĉornohuz (n. 1995, Kijivo) estas ukraina poetino, partoprenanto de la rusa-ukraina milito.

Diplomiĝis ĉe la Fakultato de Humanismaj Sciencoj de la Kijivo-Mohila Akademio (2019).

Dum la studado, ŝi ankaŭ laboris ĉe eldonejo kiel tradukisto, kio inkluzivis tradukadon de libroj de la angla al la ukraina. Laŭ la revuo Forbes, ŝi estas inter la 100 plej influaj virinoj en Ukrainio, rangante 29-e.

Ĉornoguz aliĝis al la ukraina militistaro en 2019 kiel medicinisto en la volontula bataliono *Hospitalistoj*, servante kiel batalmedicinisto dum la milito en Donbaso. La 22-an de januaro 2020, ŝia koramiko Mikola Soroĉuk mortis en batalo. Post la morto de ŝia partnero, ŝi fariĝis kontraktita soldato por la Ukraina Armeo, batalante en Popasna, Mariupolo kaj Bahmuto. Ŝi ricevis medalojn *Pro Vivo Savita*, *Pro militservo al Ukrainio*.

Jarina devenas de fama literatura familio de Ĉornohuzoj. Avo – Oleg Ĉornohuz (1936–2022) estis elstara ukraina satiristo de monda nivelo, gajninto de multaj literaturaj premioj. Patro – fama poeto kaj banduristo Jaroslav Ĉornohuz, gajninto de literatura kaj arta premioj.

Aŭtoro de 3 poemaroj: *Kiel fleksiĝas la fajra rondo* (2020, al koramiko Mikola Soroĉuk). Ĉi tiu unua kolekto ricevis la Literaturan premion de I. Ohienko. La dua libro [*dasein: defendo de ĉeesto*] ricevis la plej altan literaturan premion de Ukrainio, la Ŝevĉenkan Nacian Premion. La tria kolekto *Nenies safrano* ĵus aperis en la eldonejo *Meridian Czernowitz*. Ŝiaj verkoj estis tradukitaj en la polan, francan, kaj nun – en Esperanton.

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la rus-ukraina milito 1917–1921

Kiam en Petrogrado (nuna Peterburgo) okazis Februara revolucio de 1917, caro Nikolao la II rezignis kaj potenco transiris al la Portempa registaro, en Kijiva ĉefurbo Kijivo ukraina registaro sub gvido de Miĥajlo Hruŝevskij

deklaris pri la aŭtonomeca kaj baldaŭ pri la tuta sendependenco de Soveta Rusujo (bolŝevistoj de Lenin mortigis membrojn de partneraj partioj).

Lenin direktis taĉmentojn de petrogradaj maristoj kontraŭ Ukrainia Popola Respubliko. Pri tiu tempo fama E-proleta poeto Eŭgeno Miĥalskij verkis poemon "Danco de skeletoj":

Danco de skeletoj

Skeletoj, skeletoj ĉirkaŭe. Mi volas forkuri, ne povas.

Skeletoj dentklakas, grimacas kaj en la dancado sin movas.

Jen ili jam estas proksime kaj manojn ostecajn eltiras

Kaj volas min kapti en brakojn, – mortecan malvarmon elspiras.

Skeletoj alpaŝas senĉese – Skeletoj ridetas rikane...

Mi falas silente genuen, mi provas forkuri, sed vane!

Mi rampas, sed estas malfrue. Min kaptas kaj premas teruro,

Skeletoj dancante alpaŝas, aŭdiĝas obtuza murmuro...

– Ha, jen Vi! Vi volas Vin savi de nia kares', ĉirkaŭpreno?!

Sed ni Vin ekamis – deziras – kaj Vi ja al ni apartenos.

Ni montros al Vi novan mondon – ni donos al Vi la Potencon,

Esencon de l'Scio senfina – nur lasu la vivon sensencan;

Nin sekvu en mondon posttomban – en mondon de solaj spiritoj...

Decidu, Vi hom'! – Ni atendas. Kaj sekvu nin tuj senhezite.

– Ne, ne! Mi ne volas, foriru! Deziras mi vivi ankoraŭ.

Mi amas la vivon kun ĝia sufero kaj akra doloro.

Se estos mi eĉ malfeliĉa – se premos min la efektivo.

Mi restos ĉi tie sur tero; – ne lasos mi kampon de l'Vivo.

Eĉ malgraŭ kruelaj ekbatoj de la Realeco sensenta,

Eĉ malgraŭ solec' de l'animo kaj malgraŭ de l'mensa turmento.

Skeletoj ekhaltis momente en sia senĉesa almovo.

Sed tuje jam grincas, rikanas kaj dancas, dancadas denove.

La 25an de Novembro 1917

Ene de tiu milito, fine de Januaro 1918 okazis batalo apud fervojstacio Kruti

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Batalo_%C4%89e_Kruto),

kiam la rusian bolŝevistan sesmil-soldatan taĉmenton sub komando de M. Muravjov, konsistantan el moskvaj soldatoj kaj maristoj de Balta militŝiparo, kontraŭstaris 300-kapa bataliono de studentoj el la Kijiva

Universitato sub la komando de kapitano

Averkij Honĉarenko. Tiun heroan gloragon de la ukraina junularo prikantis renoma ukraina poeto Paŭlo Tiĉina (1891–1967):

Memore al la tridekopo

Ĉe Askolda tombo-monto

Freŝfosita ter':

Tridek junaj ukrainoj

Falis en sufer'.

Kuŝas en la ter' la kremo

De Ukraini'!

Al futur' laŭ sanga vojo

Devos iri ni.

Kiun do atencis venĝe

La perfida man'?

L' suno brilas, ludas vento,

Plaŭdas Dnibr'-titan'...

Ĉu Kaino renaskiĝis?

Dio, punu lin!

La patrion ili ĉiuj

Amis ĝis la fin'.

En la Nova Testamento

Sankta sinofer' –


Ĉe Askolda tombo-monto

Freŝfosita ter'.

Tradukis Paŭlo Moĵaev



Entombigo de herooj en majo 1918. Junaj viktimoj de tiu batalo estis enterigita en Kijivo.



Sur la bataalkampo estis strarigita monumento.



Ĉar plejmulto de la taĉmento konsistis el la studentoj de la Kijiva universitato, la monumento kopiis la kolonon de la ĉefa enirejo de la Universitato.

Esperable, tiuj aldonoj helpas al la legantoj de la "Ora Ĵurnalo" kompreni batalon de defendantoj de Ukrainujo kontraŭ moskvanoj

en milito, kiu, fakte, daŭras de la jaro 1654.

Viktoro Pajuk


Internacia Tago pri tradukado

La Internacia tago pri tradukado estas festata ĉiujare je la 30-a de Septembro, kio koincidas kun la tago de Sankta Hieronimo, tradukisto-reviziisto, kiu estas konsiderata la pioniro kaj patrono de la tradukistoj, ĉar li tradukis la Biblion ('Vulgato') en la latinan.

Sankta Hieronimo naskiĝis en urbeto Stridono (nuna Bosnio) tri centjarojn pli frue, ol kiam tien ĉi venis blankaj kroatoj de Ukrainio. Li estas konata per sia latina traduko de Biblio (el aramea-hebrea-helena lingvoj), kiun Rom-katolikoj uzas eĉ nun. "Ankoraŭ de tempo de mia juneco mi tradukis ne vorton, sed ideon," – diris St. Hieronimo en 404.

"De tradukado disburĝoniĝis ĉiuj sciencoj" – ĉi tiun citaĵon de Giordano Bruno donis John Florio (1603), samtempulo de Ŝekspiro, la unua kompilanto de la itala-angla vortaro kaj la tradukisto de Dekameron de Boccaccio en la anglan dum la regado de Elizabeto la 1-a. Sed persoj praktikis ĉi tiun ideon multe pli frue. Jam en la 8-a–10-a jarcentoj ekzistis lernejo en Jundiapur (Persujo), kie nestorianaj kristanoj parolis la grekan, judoj parolis la hebrean kaj aramean, kaj hindaj kleruloj parolis la sanskriton. Dum sia ekzisto, la skolanoj tradukis la plej bonajn atingojn de scienco kaj kulturo en la araban.

La celo de la Internacia tago pri tradukado estas reaserti, ke la profesio kaj arto de tradukistoj, terminologoj kaj interpretistoj ludas gravan rolon por atingi la celojn kaj principojn de la Ĉarto de UN, proksimigante popolojn, antaŭenigante dialogon, interkompreniĝon kaj kunlaboron, garantianta disvolviĝon kaj plifortigante pacon kaj sekurecon internacie. Kie ajn io



estas parolata, skribata, legata aŭ kantata, tradukistoj partoprenas. Estas danke al ili ke la mondo povas rimarki la scion de ĉiuj aliaj homoj en sia propra lingvo kaj eble ŝanĝi ilian konscion.

Kompetenta tradukisto estas ne nur dulingva sed ankaŭ dukultura. Lingvo ne estas nur kolekto de vortoj kaj de gramatikaj kaj sintaksaj reguloj por generi frazojn, sed ankaŭ vasta interkonekta sistemo de konotacioj kaj kulturaj referencoj, kies majstrado, skribas lingvisto Mario Pei, "preskaŭ estas dumviva laboro".

Mi kore gratulas kolegojn kaj samideanojn-tradukistojn okaze de nia profesia dumviva festo, ja Esperantistoj estas preskaŭ ĉiutagaj tradukantoj! Estu sanaj!

Viktoro Pajuk

ATA-certigita angla-ukraina tradukisto

P.S. Por imagi laboron de tradukisto, bv legi ĉi suban rakonton.

"Arto en traduko" de Tony Beckwith

La angla originalo unue aperis en la aŭtuna 2010 numero de "Source" – reta bulteno de Literatura Fako de ATA (Amerika Tradukista Asocio) kaj poste estis surpaperigita por la januara numero 2011 de "The ATA Chronicle". La publikado de la traduko estas permesita.

*"En piedpilko bone ludi ne sufiĉas:
oni devas senti la ludon profunde."
Jules Rimet*

Madrido varmis somere. Mia loĝejo estis sufoka kun la fermitaj fenestroj, kaj la malfermo de ili ne multe helpis. La ĉiujara elirego de patrinoj kun infanoj estis je sia apogeo, kaj la urbo sentis sin komforte malplena pro la foresto de tiuj, kiuj retiriĝis de la varmego por pasigi kion eble plej longan tempon en la montoj aŭ ĉe la marbordo. Por mi tio estis la plej ŝatata tempo de jaro.

Estis jam post la noktomezo, kaj mi sidis en la flaketo da lumo en la malhela gast-ĉambro sur la tria etaĝo. La fenestro antaŭ mi estis malfermita, enkadrigante mian vidon de la nokta ĉielo pendanta super la kvieta kvartalo. La varma aero pigre kirliĝis ĉirkaŭ mi kaj mi sidis ĉe mia skribtablo, la fingroj sur la klavaro de mia tajpilo – verda porteblo Olivetti, mia fiero kaj ĝojo.

Kutima afero. Oni telefonis al mi posttagmeze por diri pri la projekto kun strikta limdato, kaj oni tute komprenus, se mi postulus la krompagon pro la urĝeco – ĉu mi interesiĝus? Konsuela enlitiĝis post la vespermanĝo kaj mi restis kun Olivetti kaj la intriga malantaŭ-kulisa rakonto pri ŝere-komerco en Andaluzio, kiu inkluzivis ampleksan historion de la suda Hispanio. Bone verkita de elokventa hispano, kun tre agrabla flueco kaj stilo, ĝi estis gracie bildeca, vera plezuro por legi. Miraklo! Kaj longa – do, mi planis ne dormi la tutan nokton.

Frumatene Konsuela ekstaris malantaŭ mi, tenante siajn manojn sur miaj ŝultroj kaj rigardante la ĉielon. "Vi ĉiam faras tion,

ricevante ion similan," ŝi diris. Mi kapjesis. "Via traduko fariĝas via *querida*," ŝi murmuris, forturnante sin, "via amatino." Ŝi pravis. La similan tradukon oni devas trakti atente. Ĝi enhavas tiom da nuancoj kaj subtilaĵoj, ke oni devas senbarakte permesi la entiriĝon. Tio postulas cedi pormomente la tutan vivon, kaj siavice stimulas pinglopintan fokusiĝon, kiu estos riĉe rekompencata.

Vicoj de miaj pensoj estis interrompitaj, kaj mi rektiĝis streĉante en la seĝo. Mia kolo estis rigidinta, ankaŭ la ŝultroj. Mi ekstaris, proksimiĝis al la fenestro kaj rigardis malsupren. Viro promenis laŭ la trotuaro de la kontraŭa stratflanko, lia ombra silueto longiĝis en lumo de la stratlanternoj. Unu mano en la poŝo, la alia svingis flanke. Atinginte la angulon, li foriĝis. Nun la strato estis senhoma kaj kvieta, kaj strange bonvena. Mi lasis noton sur la tajpilo kaj iris malsupren. La kafejo "Gijón" estis proksime, kaj estos agrable promeni tien. "Gijón", ŝajne, neniam estis fermata, kaj kelkaj gastoj jam sidis tie, kiam mi alvenis. Mi mendis viskion kun sodakvo en alta glaso. Mano falis sur mian ŝultron, kaj mi turnis min. "Hombre, ¡Javier!" Ksaviero estas verkisto, kiu laboris ankaŭ kiel tradukisto, deviganta fari tion pro cirkonstancoj. Li komprenas noktulojn de sia propra sperto kaj deziras scii, "Kiel vi fartas?"

"Ĉio bonordas," mi diris al li. La rakontado estas bona, la vortprovizo estas bona, sed mi estas penanta transdoni la tonon de la originalo; vi ja scias, la etoson, la deĵo, la

esencon de Andaluzio, kio estas tiom grava parto de la novelo. Ĝis nun mi ne kaptis tion.”

Ksaviero larĝe ridetis kaj mendis ankoraŭ po unu trinkaĵo. ”Etoso? Dejo? Esenco? Kiaj vortoj! Kion vi intencas fari, krei artaĵon?”

Kelkaj estas bone verkitaj, sed tre malofte ni trovas ion nepre tradukindan. Tio ĉi estas unu el tiaj. Mi volus fari tion, kion faris la verkisto hispane. Mi volas, ke la angla versio posedu saman *duende*, la saman magian kvaliton, kiel la originalo.”

Ksaviero kapjesis kaj ekridetis. ”Mi rekonas ĉi tiujn simptomojn! Ankaŭ mi jam estis trafita, samkiel vi ĉi vespere. Laŭ mi, amiko mia, transfuzo de flamenko – jen kion vi bezonas ĉi-momente. Iru, mi regalos per trinkaĵoj en ”Las Brujas”.

Nenio estas pli animplena, ol sonoj de la flamenka kantisto, precipe kiam ĝi serpentumas ene kaj ekstere de la muziko de la flamenka gitaro por serenadi la krudan pasion de la flamenka dancisto. En la malhela, fuma lumo en ”Las Brujas” ni sentis la pulsadon de aplaŭdantaj manoj kaj la pistadon de kalkanoj, kaj ni ekspiris iomete pli profunde. ”Vi deziras priskribi la odoron kaj la esencon de Andaluzio?” Ksaviero kriegis. ”Tio ĉi estas vera Andaluzio.” Li pravis. Flamenko venis de Nord-Afriko kun la maŭroj kaj suda Hispanio heredis la muzikon de la dezerto. Ekde tiam, la grandaj urboj Granado, Sevilo kaj Kordobo produktis generacion post generacio de flamenkaj artistoj, kiuj konservas la tradicion de iliaj prapatroj, de tiuj, kiuj ekloĝis en Andaluso. ”Kaj ĝi ne estas nur tio, kion vi povas aŭdi ĉe flamenka *tabla*o, kiel tiu ĉi,” aldonis Ksaviero. ”Iam eksidu kviete, prefereble kun okuloj fermitaj, kaj aŭskultu – vere aŭskultu! – al Recuerdos de la Alhambra de Tárrega. Vi saturiĝos per la esenco de la sudo.”

La strato estis senhoma, kiam ni lasis la trinkejon. Ni piediris tra la Calle Mayor al la

Paseo kaj baldaŭ estis rigardantaj la Muzeon Prado, blanke lumanta apud la Parque Retiro. ”Ĉu vi deziras meti iom da arto en vian tradukon?” Ksaviero demandis, indikante per sia cigaro. ”Estas multe da arto tie!”

”Estas domaĝo, ke ĝi estas fermita,” mi diris.



”Por favor!” ekspudetis Ksaviero, frapante sian frunton per la libera mano. ”Kiel vi intencas enmeti arton en vian tradukon kun la simila sinteno? Iru kun mi!” Li prenis mian brakon kaj kondukis min trans la straton, poste li malrapide promenigis min tien kaj reen laŭ apudmuzea trotuaro, parolante serioze kaj trude. ”Se vi volas, ke via traduko estu arta kreaĵo, la arto devas esti ene de vi. Ĉio vidata kaj kompenata de vi inspiru vian vort-elekton. Pensu pri la pentraĵoj kaj la skulptaĵoj, viditaj tie ĉi. Memoru pri Goyas, Velásques, la malnovaj majstroj, ĉu vi povas imagi ilin en via menso? Rigardu ilin pli atente. Ili ja parolas al vi; ili volas ion diri al vi. Aŭskultu!”

Mi faris tion, kaj mia menso estis plenigita per pensoj de formo kaj koloro, propocio kaj perspektivo. La fingroj de la statuaj manoj

ekmovis, kaj la siluetoj de ŝia ŝtona korpo memorigis al mi jam konatan belecon. Resono de historio eniris mian memoron, kaj la pasinteco ekpaŝis antaŭen en la lumon. Ĉio havis ritmon kaj kialon, kaj mi eksentis, kion oni penis diri. Subite mi ekvolis reveni al mia traduko. Mi diris tion al Ksaviero kaj li ekridis, "Ĉu vi aŭdis la urĝan vokon de la amatino, kiun vi ne povas ignori? Do, tempo venis. Ni iru hejmen!"

Ni devis trapasi nur kelkajn kvartalojn, kaj promenado estis agrabla, unu mano en la poŝo dum la alia svingis flanke. La senhomeco de la stratoj kreis senton de spaco, proponanta senfinajn eblecojn. La graciaj linioj de trafikcirklo aludis al pli frua epoko,

kiam estis tempo por paŭzi kaj gustumi specifajn momentojn, vivi pli malrapide kaj en harmonio kun onia ĉirkaŭaĵo. Idilia tempo, venis al mi en la kapon, kiam ŝereo epitomigis vivmanieron.

Reen en la loĝejon, la lampo ankoraŭ brilis super la tajpilo. Mia noto restis nelegita. Mi fermis la kuirejan pordon kaj preparis iom da kafo. Poste mi staris ĉe la fenestro kaj rigardis la unuan lumon, aperanta sur la horizonto. Mia menso estis klara kaj mi sentis min ekscitita. Mi sidiĝis kaj eklaboris.

*Esperantigis membroj de la Esperanto Societo
de Ŝikago*

La homa arto de interpretado

Riksablo, somere 2025

Ĉi-somere mi unuafoje ĉeestis Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en la urbo Burno, ĉefurbo de Moravio, en Ĉeĥio. Mi spertis multaj okazaĵojn, kaj feliĉajn kaj ne tiom, sed la plej pensiga temo, kiu restas poste en mia menso, estas la malfacila arto de interpretado. Mi ne skribas pri tradukado. Por fari tradukon, oni kutime laboras papere aŭ ekrane, plejofte helpante de vortaro; kaj oni ĝenerale havas tempon por kontroli malnetan version kaj serĉi esprimojn pli ĝustajn aŭ pli elegantajn. Male, mi skribas pri situacio en kiu unu homo parolas en sian lingvon kaj alia homo, tuj kiam paŭzas la parolanto, devas esprimi la signifojn (kiel eble plej similajn) en alia lingvo, alterne.

Grandaj internaciaj organizoj dungas profesiajn interpretistojn por tia laboro, sed la temo eniris mian menson dum la UK ĉar mi spektis/aŭdis plurajn epizodojn kiam neprofesiaj interpretantoj devis praktiki tiun arton dum la kongreso. Unu ekzemplo estis de la korea al Esperanto, la aliaj estis de la ĉeĥa al Esperanto. Mi opinias, ke tio estas


laŭtema ĉar unu el la temoj de la kongreso estis «Esperanto kiel ponto inter popoloj». Interpretado kreas ponton inter homoj.

Mi ne estas speciale lerta pri tiu ĉi temo, sed eble mi taŭgas por diskuti ĝin pro du kialoj: unue, mi iom post iom surdiĝas; due, mia scio de Esperanto malperfektas. Kial tiaj difektoj iasence valorigas miajn opiniojn prie? Ĉar bona interpretado devas funkcii ne nur por tre lerta aŭdantaro sed ankaŭ por tiuj kies komprenkapablo proksimas al la marĝeno inter sukceso kaj fiasko.

Mia unua ekzemplo okazis dum prelego pri Ŭonbulismo. (La unua litero, ŭ, laŭ nia akademio, ne konformas al la ĝusta skribmaniero de Esperanto, sed mi trovas ĝin ĉarma.) Ankaŭ ĉarma en miaj okuloj kaj oreloj estis la homa interagado inter interpretantino kaj majstro de meditado dum la sesio. La spertulo parolis, ne tro rapide, en la korea kaj la interpretantino tradukis por ni en Esperanton. Ne nur estis ŝiaj esprimoj tute komprenablaj de mi, la eterna surdiĝonto, mi ankaŭ ĝuis la etoson inter la parolanto kaj la

interpretanto. Ja, mi supozis ke ŝi estas samkredano kun li, kaj certe ŝi montris respekton, sed ŝia sinteno ne estis tute humila; la vorto mi elektis por priskribi la komunika etoso inter la paro estis «ludema». Mi konjektas ke tio spegulas la filozofion de

Ŭonbulismo. Kompreneble, mi ne povas juĝi ĉu la lingva interpretado estis ĝusta; kaj vi ne povas juĝi ĉu mia interpreto de la interhoma sinteno estis ĝusta, sed ajnakaze tiu sperto plaĉis al mi, kaj levis la temon de interpretado en mia menso.



Sekva kazo de interpretado okazis dum ekskurso por viziti la batalkampon de Austerlitz kie Napoleono venkis la du imperiestrojn de Aŭstrio kaj Rusio. Kvankam mi jam vizitis Burno en 2010, mi nur sciis pro la kongresaj dokumentoj ke tiu batalo okazis malpli ol 20 kilometrojn for de Burno, en 1805, apud vilaĝo kiu nun nomiĝas Slavkov. La buso prenis nin unue al la monteto Ĵuranj, kiu estis la ĉefstabejo de Napoleono dum la batalo. De tie ni povis vidi la monteton Prazen, la ĉefstabejo de la du kontraŭaj imperiestroj. Ankaŭ ĉe Ĵuranj oni povas vidi metalan mapon de la batalkampo sur

pedestalo. Mi ne lernis multajn detalojn de tiu mapo, sed bonŝance membro de la loka organizantaro, Marek, estis kun ni. Li estas lokano kiu entuziasme informis nin pri la fruaj etapoj de la batalo.

Post tiam ni revenis al la buso kaj veturis al la monteto Prazen. Tie oni konstruis, pli ol jarcenton post la batalo, memorigan monumenton al la mortintoj de kvar popoloj, aŭstra, franca, rusa kaj ĉeĥa. Tie ĉiĉerono kuniĝis al ni. Marek interpretis inter la ĉiĉerono kaj ni turistoj, denove entuziasme. Do mi akiris alian ekzemplon de interpretado por pripensi. Denove la etoso inter la du

agantoj ŝajnis harmonia. Ambaŭ homoj estis kleraj pri la temo, kaj ili ŝajnis ĝui la ŝancon informi aliulojn pri iliaj scioj. Mi sentis ke mi povis kompreni preskaŭ ĉion, kion Marek diris.

Post tagmanĝo en la kastelo Slavkov, la ekskurso inkluzivis rondiron tra multaj ĉambroj en la kastelo, kun alia ĉiĉerono. Komence de la rondiro ni devis porti grandajn pantoflojn super niaj ŝuoj por protekti la plankojn kaj valorajn tapiŝojn kontraŭ niaj malpuraj tretadoj. Tie mi havis alian ekzemplon de la arto de interpretado. Ĝi komenciĝis bone, sed la rondiro daŭris dum preskaŭ horo kaj duono, kaj nia neprofesia interpretanto, Josef, kutime marŝis helpe de lambastonoj. Mi laciĝis post ĉirkaŭ duonhoro. Ankaŭ evidentiĝis, ke Josef pli kaj pli laciĝis. Kiel lia voĉo malfortiĝis kaj malrapidiĝis, la frazoj kaj precipe la gestoj de la ĉiĉerono iĝis ĉiam pli energiaj. Do mi akiris por mia mensa kolekto de tiu arto alian ekzemplon, ne tiom harmonian kiom la aliaj.

Sekvatage, la kongresejo restis fermita, kaj neniuj oficiala programero okazis. Do mi povis esplori la urbon kaj trovis informojn kaj poŝtoŝtampojn, kie mi povis sendi poŝtkartojn al miaj nepoj. Ankaŭ mi povas sperti specon de interpretado, ne tre kontentiga.

Ĉe la urba informejo mi renkontis korean kongresaninon, kaj invitis ŝin kafumi. Ni sidiĝis en apuda kafejo kaj mendis niajn trinkaĵojn. Pro malsukceso en serioztema konversacio je la hieraŭo, mi iom timis ke mi ne bone povus apogi sukcesan interkomunikadon. Tute malsimila afero! Montriĝis ke ŝi jam ĉeestis tri aliajn esperantajn eventojn ĉi-somere, en kelkaj landoj, inkluzive de la Baltaj Esperanto-Tagoj en Kaŭno, Litovio, kaj intencis partopreni en kvaran post la Universala Kongreso. Tamen, ŝi ne bone parolis esperante. Ŝajnis ke ŝi sufiĉe

bone komprenis min, sed kiam ŝi volis komuniki, ŝi skribis kaj desegnis en kajero kaj montris ĝin al mi, aŭ tajpis en ŝian poŝtelefono koree kaj montris al mi la tradukon esperantan. Jes, ni sukcesis transdoni iom da informo tiamaniere, sed malglate. Laŭ mi, tio ne estis vera konversacio, kaj iom kontraŭ centra celo de Esperanto.

Du tagojn poste, elstara sperto por mi estis alia ekskurso, al la Vilao Tugendhat, kiu situas tre proksime al la kongresejo. Tiu domo estas mondfama ekzemplo de modernista arkitekturo. Ludwig Mies van der Rohe dezajnis ĝin. La konstruaĵo havas eventoplenan historion. Ĝia konstruo komenciĝis en 1929 kaj finiĝis en 1930. La posedantoj estis juda geedziĝa paro kiu devis forflugi ĵus antaŭ ol kiam la naziistoj invadis Ĉeĥoslovakion en 1938. Ĝi funkciis kiel loĝejo kun oficejoj por germanaj militistoj ĝis la soveta armeo forpuŝis la germanojn en 1945. Tiam, laŭdire, ĝi estis portempe ĉevalejo kaj en tiu periodo la plejparto de la mebloj estis perdita aŭ detruita. Post la milito la konstruaĵo havis diversajn uzojn, ekzemple kiel dancloĝejo. Nur post 2002 ĝi iĝis parto de la ĉeĥa kaj homa heredaĵo kaj nun estas vizitinda muzeo.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Vilao_Tugendhat

Bonŝance la plej multekosta kaj, laŭ mi, la plej bela el la internaj valoroj ne estis difektita. Temas pri la muro farita de marmoro el la atlasaj montoj. Mi legis rete, ke tiu muro kostis 3 milionojn da tiutempaj ĉeĥaj kronoj, el plena kosto de 8 milionoj da kronoj por la tuta konstruaĵo. Fama diraĵo de Mies van der Rohe estis «malpli estas pli», kiu ŝajne malkongruas kun tiom da elspezo; sed ajnakaze ege plaĉas al mi vidi la rezulton de tiu kontraŭdiro.



Tiu vizito provizis al mi aldonan okazon por spekti ekzemplon de la arto de interpretado. Tiufoje estis denove harmonia. Laŭ mia percepto, nia loka interpretantino interagis bone kun la ĉiĉeronino. Ambaŭ ŝajnis entuziasmaj kaj la ĉiĉeronino evidente havis abundan scion pri la konstruaĵo kaj abundan sperton de priparoli ĝin. Nur dum la finaj dek minutoj de du-hora rondiro nia interpretantino ŝajnis iom laciĝi, rememorigo ke tiu arto ne estas facila.

